

Laborista Esperantisto

15DE JAARGANG, No. 2, 6 FEBRUARI 1946
OPLAAG 4000 EXEMPLAREN PER MAAND
ABONNEMENT f 1.75 PER JAAR. LOSSE NUMMERS f 0.15. VOOR LEDEN GRATIS

Adres Redactie, Administratie en Secretariaat van de Federatie van Arbeidsers-Esperantisten:
Postbus 8002, Amsterdam-West
Postgiro Amsterdam 111278

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

OPROEP aan de Nederlandse Esperantisten



22 December 1945 een historische dag.

Op bovengenoemde datum werd door de vertegenwoordigers van de hoofdbesturen van de „Federatie van Arbeiders-Esperantisten in het gebied van de Nederlandse taal" (F.L.E.), de Nederlandse Esperantisten-Vereniging „La Estonto Estas Nia" (L.E.E.N.), de Nederlandse Rooms-Katholieke Esperantisten-Bond „Nederlanda Katoliko" (N.K.) en de „Nederlandse Christelijke Esperanto Vereniging" (N.C.E.V.) op initiatief van eerstgenoemde organisatie, te Amsterdam opgericht:

Nederlanda Centra Komitato Esperantista (N.C.K.E.) (Centraal Comité van de Esperanto-beweging in Nederland).

Het doel van dit comité is omschreven in art. 1 van de overeenkomst, dat luidt:

Het Centraal Comité vertegenwoordigt de Nederlandse Esperanto-beweging bij regerings- en openbare instanties, en onderneemt alle werkzaamheden, die de deelnemende organisaties gemeen hebben.

Bovendien verzorgt het Centraal Comité het voortdurend contact tussen de samenwerkende organisaties.

Op 26 Januari j.l. vond de eerste bijeenkomst van dit Comité plaats. Tot voorzitter werd gekozen de heer A. Veen, tot vice-voorzitters de heren J. D. Brakel, Mr. A. Kalma en L. G. C. de Jong, terwijl de heer A. F. Leideritz Jr. de functie van secretaris-penningmeester aanvaardde. Het adres van laatstgenoemde is: Vechtstraat 5², Amsterdam-Zuid.

Bovendien besloten de vier genoemde verenigingen tot volledige samenwerking inzake de organisatie der landelijke Esperanto-examens, zodat we wel mogen aannemen, dat er voortaan als vanouds één Esperanto-examencommissie zal bestaan. Deze zal voor het eerst op 9 Februari in haar nieuwe samenstelling bijeen komen; haar eerste publicatie kunt U weldra tegemoet zien.

Wij menen te mogen zeggen, dat met de totstandkoming van deze samenwerking aan een langgekoesterde, algemene wens is voldaan.

Wij vertrouwen, dat we gezamenlijk iets goeds tot stand zullen brengen ter bereiking van ons gemeenschappelijk doel.

Wij weten, dat wij Esperantisten terrein hebben verloren onder invloed van de afschuwelijke gebeurtenissen der laatste jaren, terrein verloren bij de pers, bij de radio, in onderwijskringen, bij autoriteiten.

ALVOKO al la Nederlanda Esperantistaro



La 22a de decembro estis historia tago.

Ĉi supre nomitan tagon la reprezentantoj el la estraroj de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo (F.L.E.), la Nederlandse Esperantisten-Vereniging „La Estonto Estas Nia" (L.E.E.N.), la Nederlandse Rooms-Katholieke Esperantisten Bond „Nederlanda Katolika" (N.K.), kaj la Nederlandse Christelijke Esperanto-Vereniging „Nederlanda Kristana Esperanto Asocio" (N.C.E.V.), fondis, laŭ iniciato de la unue nomita organizo, en kunveno okazanta en Amsterdam, la

Nederlanda Centra Komitato Esperantista (N.C.K.E.)

La celo de ĉi tiu komitato esprimiĝas en art. la de la Interkonsento, kaj tekstas:

N.C.K.E. reprezentas la nederlandan esperantistaron antaŭ ŝtataj kaj publikaj instancoj, kaj okupas sin pri ĉiuj taskoj, kiuj estas komunaj al la partoprenantaj asocioj.

Krome ĝi konsistigas la daŭran kontakton inter la kunlaborantaj asocioj.

La 26an de januaro okazis la unua kunveno de ĉi tiu komitato.

Kiel prezidanto elektiĝis sinjoro A. Veen, kiel vicprezidantoj sinjoroj J. D. Brakel, Mr. A. Kalma kaj L. G. C. de Jong; la funkcion de sekretario-kasisto akceptis sinjoro A. F. Leideritz Jr.

La adreso de ĉi lastnomita funkciulo estas: Vechtstraat 5², Amsterdam-Zuid.

La kvar nomitaj organizoj krome decidis pri plena kunlaboro koncerne la organizadon de la landaj Esperanto-ekzamenoj, kaj tiel eventiĝas, ke en la estonteco, same kiel antaŭ jaroj, denove funkcios nur unu Esperanto-Ekzamena Komitato. Ĉi tiu komitato unuafoje laŭ nova konsisto kunvenos la 9an de februaro; ĝiajn unuajn komunikojn vi en proksima tempo povos atendi.

Ni kuraĝas konjekti, ke pro la realiĝo de ĉi tiu kunlaboro plenumiĝas deziro jam de longe en la nederlanda Esperanto-movado sentata.

Ni konscias pri tio, ke ni per kunlaboro povos efektiviĝi ion, kio multe favoras al nia komuna celo.

Ni scias, ke ni, Esperantistoj, perdis influon pro la abomenaj okazajoj en la pasinntaj jaroj, influon ĉe la gazet-

Wij weten echter ook, dat de wereld haakt naar een hechte, stevig verankerde vrede, en dat zij elk middel zal aanvaarden, dat er toe bijdraagt deze tot stand te brengen, en dat het daarom door gezamenlijke krachtsinspanning mogelijk is in korte tijd het terrein te herwinnen, en daarna verdere schreden te zetten op de weg der overwinning.

Wij zijn er ons van bewust, dat we alléén zullen slagen, als wij ons geruggesteund weten door alle Esperantisten in den lande, man voor man, vrouw voor vrouw.

Het eerst nodige ter bereiking van ons doel is de sterkmaking van onze eigen organisaties, de vergroting van onze ledentallen, de uitbreiding onzer organen, de versteviging onzer kassen.

Wij allen moeten gedachtig zijn aan onze echt Nederlandse spreuk: „Eendracht maakt macht."

Daarom doen wij een beroep op alle Nederlandse Esperantisten, zich thans aan te sluiten bij één der vier bovengenoemde organisaties, waarvan U de adressen hieronder vermeld vindt.

Geestverwanten! Er is voor U thans geen reden meer om U afzijdig te houden, geen verontschuldiging om ter zijde te blijven staan. Sluit U aan, hetzij individueel, hetzij als plaatselijke afdeling. Wij hebben U nodig, U hebt ons evenzeer nodig. **Samen moeten wij voorwaarts,** we moeten samen opmarcheren.

Doeltreffend werk kan gedaan worden slechts door middel van organisatie, en naast plaatselijk optreden is landelijke verbondenheid een noodzakelijke eis.

Er kan voor geen enkele doelbewuste esperantist ook maar één enkel motief bestaan om zich afzijdig te houden van het organisatorisch verband.

Wij roepen daarom alle esperantisten en groepen van esperantisten op, toe te treden tot die van de samenwerkende Nederlandse Esperanto-verenigingen, waarmede men zich geestelijk het meest verbonden gevoelt. Daarmede versterkt men niet alleen de betrokken vereniging, maar tevens de invloed, die van de Nederlandse Esperanto-beweging kan uitgaan.

De wereld let op ons!

A. Veen,
Voorzitter F.L.E.
P. W. Baas,
Voorzitter L.E.E.N.
L. G. C. de Jong,
Voorzitter N.K.
J. D. Brakel,
Voorzitter N.C.E.V.

Adressen:

F.L.E., S-ro W. F. Kruit, Postbus 8002, Amsterdam-W.
L.E.E.N., Mr. A. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.
N.K., S-ro A. F. Leideritz Jr., Vechtstraat 5^2, Amsterdam-Zuid.
N.C.E.V., S-ro R. van Spronzen, Soestdijksekade 938, Den Haag.

Wij verzoeken onze lezers vriendelijk doch dringend, namen en adressen van ongeorganiseerde esperantisten en niet-aangesloten plaatselijke groepen op te geven aan een der bovenstaande adressen, opdat wij hun een exemplaar van deze oproep kunnen doen toekomen.

aro, ĉe la radio, inter la instruistaro kaj inter la aŭtoritaloj.

Ni scias tamen ankaŭ, ke la mondo sopiras al firma kaj solide fiksita paco, ke oni inklinas akcepti ĉiun ajn rimedon, kiu povas kontribui al tio, kaj ke pro tio eblas rehavigi al ni saman pozicion, kiun ni okupis antaŭ la milito. Tiam ni ekmarŝos antaŭen sur la voja al la venko.

Ni plene konscias pri tio, ke ni povos sukcesi nur, se ĉiuj esperantistoj en la tuta lando subtenos nin, viroj kaj virinoj, ŝultron ĉe ŝultro.

Plej necesaj por atingi nian celon estas la plifortigo de niaj organizoj, la pligrandigo de la nombroj de niaj membroj, la pliampleksigo de niaj organoj, la certigo de niaj financaj pozicioj.

Ni ĉiuj konsiu pri la proverbo: Unueco donas fortecon. Tial ni **alvokas ĉiujn nederlandajn esperantistojn nun aliĝi al unu el la kvar supre nomitaj organizoj,** de kiuj vi ĉi sube povas legi la adresojn.

Samideanoj kaj kamaradoj! Nun ne plu estas motivo por vi resti ekster la organizoj, nenia pravigebla kialo por resti izolaj.

Aliĝu, ĉu individue ĉu kiel loka sekcio. Ni bezonas vin, same kiel vi bezonas nin. **Ni kune iru antaŭen! Kunagado** signifas progreson. En la nuna tempo la neorganizita esperantisto signifas perdon al nia movado, komuna agado progreson plej efikan.

Celtrafa laboro povas okazi nur en organiza kadro. Apud loka ligiteco necesas ankaŭ tutlanda interligiĝo. Por neniu ekzistas pravigebla motivo teni sin aparte de la organizita esperantistaro.

Ni sekve alvokas ĉiujn esperantistojn aŭ grupojn da esperantistoj aliĝi al tiu el la kvar nederlanda Esperanto-asocioj, al kiu ili sentas sin spirite plej proksimaj. Per tio oni plifortigas ne nur la koncernatan asocion, sed ankaŭ la tutan agadpovon de la nederlanda Esperanto-movado.

La homaro atentas nin!

A. Veen,
Prezidanto F.L.E.
P. W. Baas,
Prezidanto L.E.E.N.
L. G. C. de Jong,
Prezidanto N.K.
J. D. Brakel,
Prezidanto N.C.E.V.

Adresoj:

F.L.E., S-ro W. F. Kruit, Postbus 8002, Amsterdam-W.
L.E.E.N., Mr. A. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.
N.K., S-ro A. F. Leideritz Jr., Vechtstraat 5^2, Amsterdam-Zuid.
N.C.E.V., S-ro R. van Spronzen, Soestdijksekade 938, Den Haag.

Ni afable, sed insiste petas al niaj gelegintoj havigi nomojn kaj adresojn de neorganisitaj esperantistoj aŭ Esperanto-grupoj al unu el suprenomitaj adresoj, por ke ni povu sendi al ili ekzempleron de ĉi tiu alvoko.

ESPERANTO-ELSENDO.

Por la unua fojo post la milito la V.A.R.A. disaŭdigos denove Esperanto-kvaron-horeton.

Sabaton, la 9an de februaro je la 2a ĝis 2.15 horo parolados k-do A. Veen, prezidanto de F.L.E. pri la temo: **Es***peranto je la servo de la pacideo.*

Aŭskultu kaj sendu dankesprimon al V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.

BONVOLA, SED PRAVA KONSILO.

Ĵus ni ricevis leteron de I.E.L. kun la informo pri aranĝo de tutmonda petskribo al la unuigitaj ŝtatoj.

Konsiderante la gravon de tia entrepreno ni ne povis ne esprimi nian konsilon al I.E.L. favore al plej ebla certigo de sukceso prokrasti ĉi aranĝon kaj antaŭ ĉio interkonsiliĝi kun la tutmonda organizaro por funde kaj plejefike en kunlaboro ĉion antaŭprepari. Kiam ni entreprenas ion tian, ni nepre devas esti certaj pri peja rezultato.


BONA PROPAGANDO.

Ĉiu ano de tempo al tempo vizitanta kuraciston trovas en la atendejo legaĵojn sur tablo.

Utiligu tiun okazon por meti inter ili propagandan broŝuron pri Esperanto. Vi povas esti certaj ke ĝi estas vidata kaj legata de multaj personoj.

Tion oni ankaŭ povas fari ĉe la dentistoj, okulkuracistoj kaj ceteraj specilistoj, kaj cetere en ĉiu konvena okazo.

Haarlem, 13-11-1945. M. Cohen.



27a F.L.E. Kongreso

★

20 - 21 - 22 Aprilo en

ALKMAAR

★

Komunikoj de la O.K.K.

La paskongreso.

Post multaj vanaj klopodoj ni fine tamen sukcesis akiri salonon por nia venonta kongreso en la fromaĝurbo. Pro la kunlaboro de la urbestraro de Alkmaar ni rajtas uzi dum la Paskotagoj la aŭlon de la Murmellius-gimnazio. Tiu ĉi bela konstruaĵo, kiu povas enhavi cirkaŭ 600 aŭ 650 personojn, situas en la proksimo de la „Alkmaarder Hout" kaj tuj apud la stacidomo. Ĝi estas vere inda por akcepti nian kongreson.

Pro la fakto ke ni spertas diversajn malfaĉilaĵojn pri la gastigado de la kongresanoj, pro kio ni ne jam povas pretigi la aliĝilojn, ni petas al la sekciaj sekretarioj jam nun sendi al ni **provizoran liston** da partoprenontoj en nia kongreso, por ke ni havu ioman superrigardon pri la nombro da gastigotoj.
Rilate la hotelprezojn ni povas informi vin, ke tiuj ĉi varias inter *f* 2.50 kaj *f* 2.75 por tranoktado kaj matenmanĝo por nokto.
Estas luksa hotelo, en kiu oni devas pagi *f* 5.50 por la samo.
Ni ankoraŭ interrilatas kun samideanoj kaj aliaj simpatiantoj kaj prizorgantoj por amasloĝejo.

Ni jam nun instigas vin partopreni nian unuan Paskokongreson post la milito. La O.K.K. faros ĉion eblan akcepti vin plej agrable.
Ni esperu, ke la iama Alkmara „Viktorio" reĵetos sur nin sian gloron.
Nia devizo estas
Pasko — renaskiĝo — rekonstruo!!

Chr. v. d. Graaf (sekr.)
Por la O.K.K.
Westerweg 173 A
Heiloo.

NIA KONGRESURBO ALKMAAR

★

Ĉi tiu urbeto en la Nordhollanda polder-pejzaĝo estas la plej elokventa ekzemplo de la grandeco, laŭ kiu malgranda urbo povas prezenti sin. Ĝi havas mezajn mezurojn, sed situante en regiono kun sufiĉe industria kaj agrikultura signifo, ĝi tamen fariĝis komerca centro de granda parto de la Nordhollandaj terkultaraj kaj brutbredproduktoj.
Lu urbeto, kiu nombras 35 mil loĝantojn, povas fieri pri historio, kiu esploreble rekte rekondukas al la naŭa jarcento. Kompreneble ĝi posedas plurajn lokojn kaj multajn konstruaĵojn kun historia signifo. La Sankta Laŭrenspreĝejo certe estas unu el la plej sendifekte konservitaj konstruaĵoj de la posta mezepoko; en sia nuna formo ĝi konstruiĝis proksimume en la jaro 1470. Antaŭe, en la 13a jarcenta, Alkmaar plurfoje kuŝis en la fokuso de la grandaj okcident-frisaj ribeloj, kaj el tio spertis domaĝon. En la komenco de la 16a jarcento ĝi tamen evoluis kaj atingis sufiĉe grandan bonstaton, kiun ĝi, malgraŭ la hispanaj atakoj, ĉiam povis tenadi. Precipe la sekigo de la ĉirkaŭaj polderoj kreskigis la terkulturon kaj brutbredadon tiom, ke ĝi fariĝis foircentro tre grava. Ankoraŭ ĝi estas kiel fromaĝfoiro la plej granda de la mondo.

daŭrigota

RAPORTO PRI LA SVEDA HELP-KOMITATO.

★

En la decembra numero de L.E. vi povis legi artikolon pri niaj Svedaj Esperanto-geamikoj, kiuj kolektas vestojn por infanoj de Esperantofamilioj en Nederlando.
Multaj anoj, pere de siaj sekciaj sekretarioj, sendis petleterojn. Kompreneble ili nun volonte aŭdos, kiel marŝas la afero.
Nu, entute ricevis la Federacio 148 leterojn, en kiuj oni petis vestojn por 635 infanoj. Ni preparis 2 grandajn listojn, kiujn ni sendis al la Sveda Helpkomitato. (Oni ne plu povos sendi petleterojn, kiam denove estos eble, ni tuj sciigos tion en L.E.). Mi regule korespondas kun la prezidanto de la komitato, kaj devas laŭdi la tre aktivan kaj simpatian laboron de niaj svedaj geamikoj. En Rotterdam jam alvenis 46 pakaĵoj por distribui tie, kaj baldaŭ alvenos ŝipo en Amsterdam, kiu aportos 56 pakaĵojn por distribui en tiu urbo. Se alvenos pakaĵoj por niaj Amsterdamaj geanoj, ili rekte ricevos poŝtkarton de ni kun la sciigo, kie kaj je kiu dato ili povos ricevi la pakaĵon. La geanoj, kiuj loĝas ekster Amsterdam ricevos sciigon pere de la sekciaj sekretarioj.

B. Bultemijer.

La gazetfonda febro.

Jam de sia estiĝo la Esperanto-movado ampleksis grandparte iom strangajn homojn, kiuj havas interesiĝon, krom pri Esperanto, ankaŭ pri ia ajn alia afero. Tio rezultas kredeble el la fakto, ke en pluraj tendencaj movadoj oni eksentis la grandan signifon, kiun Esperanto povas havi por la disvastigado de iaj ideoj. Sed natura sekvo el tio estas, ke pro siaj diversaj, ofte inter si kontraŭaj tendencoj la esperantistoj malfacile povas veni al por ĉiuj kontentiga organiza sistemo, kaj ke internaj kvereloj ne estas maloftaj fenomenoj. Pluraj unuopuloj kaj etaj grupoj sentas ian deziron al memstareco kaj malfacile kutimiĝas al por ĉiuj validaj organizaj reguloj.
Tiun ĉi fakton mi opinias la ĉefa kaŭzo de stranga fenomeno, kiu de l' estiĝo de Esperanto malbone influis ĝian disvastiĝon. Mi celas la inklinon de multaj esperantistoj, jus lernintaj la lingvon, traduki ian verketon, nur ili mem plaĉantan, kaj eldoni ĝin, verki kaj publikigi tordafrazajn flikaspektajn poemojn, kaj precipe: redakti kaj eldoni ian gazeton.
Kaj ĝuste al tio lasta mi deziras dediĉi kelke da vortoj.
Se propagandacele ni disdirus, ke en Esperanto aperas eble jam cento da gazetoj, ni certe imponus la publikon. Sed se ni aldonus al tio, ke la plimulto da tiuj gazetoj estas nur ciklostile presitaj kvar- aŭ eĉ dupaĝaj folietoj, ke multaj nur vegetas pro nesufiĉe da abonantoj, ke en la tuta historio de nia lingvo oni facile povas kalkuli centon da gazetoj, kiuj apenaŭ atingis la vivodaŭron de unu jarkolekto, ke de multaj aperis nur unu numero, kaj precipe, ke la grandan plimulton plenigis nur la skribaĉado de mallertaj, senspertaj redaktemuloj, kiuj apenaŭ sciis la precipajn regulojn de la gramatiko, la imponiĝo de l' publiko unubate ŝanĝiĝus en malŝaton kaj mokemon.
Jam multe kontraŭbatalis tiun ĉi bedaŭrindan fenomenon pluraj seriozaj esperantistoj, precipe redaktoroj de gazetoj fidindaj kaj estraranoj de gravaj organizoj. Kaj tamen, malgraŭ tiu kontraŭagado de tag' al tago denove sin levas tia etredaktoro kun propralingvaĉa gazeteto, vane klopodante varbi kontentige sufiĉe da abonantoj per la preteksto, ke lia gazeto plenumas jam longe sentitan bezonon, sed kaptante en sian reton nur naivulojn, bonkredemulojn kaj homojn, kiuj opinias, ke ĉio, kio portas Esperantajn literojn aŭ verdan koloron, meritas ilian subtenon. Ĉiu tia agado nepre malsukcesas, kion plene pruvas la historio. Sed malgraŭ tio ĉiu renove aperanta gazeteto sensignifa alportas al ni novan malutilon: ĝi seniluziigas bonkredemulojn, senutile foruzas ilian monon, kaj precipe.... ĝi detenas nepre bezonatajn fortojn kaj monon for de la organizoj kaj gazetoj, kiuj efektive meritas nian daŭran subtenon.
Decas denove averti kontraŭ tia agado. Jam renove aperis sur nia lingvotereno homoj, kiuj nepre deziras redaktori, foruzi aliies monon k.t.p. Ni atentu tion kaj zorgu, ne nur, ke oni mem ne kaptiĝu en iliajn retojn, sed ankaŭ kaj precipe, ke la esperantista publiko nepre konvinkiĝu pri la malutiloj, kiujn alportas ilia agado. Kiu disponas pri mono elspezota, tiu subtenu la seriozajn gazetojn kaj la gravajn organizojn!

G. J. D

ANONCO.

Nia grupo intencas organizi ekspozicion de ricevitaj ilustritaj poŝtkartoj.
Bonvolu helpi nin per sendo de bildkarto kun salutaj kaj propagandaj surskriboj.
Adreso: Machu André, sekretario de la Esperanto-grupo en Denain, 17 Rue Ferrer, Denain (N), Francio.
Respondo per ilustrita poŝtkarto estas garantiita.

RAPORTO pri la agado de la Federacio dum la kvin lastaj monatoj de la jaro 1945.

★

La nun prezentata raporto fakte ampleksas nur la lastajn kvin monatojn de 1945a, ĉar en nia oktobra kongreso jam estis pritraktata la antaŭa periodo. Sufiĉos sekve resume mencii la ĉefajn faktojn, gravajn, kaj interesajn, ankaŭ por nia nuna raporto.

La jaro 1945a estis markata de la konstruo, rekonstruo de la aparato mem. Refondiĝis la sekcioj kaj distriktoj, L.E. denove eliris kaj pluraj planoj por la plua reakiro de nia antaŭa konstelacio, kia la reaperiĝo de L.P. trovis sian decidon en la pasintaj monatoj. Pri plifortiĝo de nia ĝenerala pozicio ankoraŭ ne estis parolo, male, ni konstatis, ke ni plurloke perdis terenon, pene konkeritan en la jaroj antaŭ 1940a. Nia unua tasko por la proksima periodo pro tio konsistas en diligenta agado por repreni nian antaŭmilitan pozicion.

Kompreneble ni ne sukcesis plene reveni al tiu stato. Ekzemple, ni disponis pri reguloj radioelsendoj pere de V.A.R.A., sed estas dubinde, ĉu ni revenos antaŭ la mikrofono en la sama formo. Tio ja dependos ne nur de nia pli malpli granda sukceso ree enpenetri en tiuj rondoj, sed ankaŭ de la aranĝoj ĉe la radio mem.*) Ni devos ankaŭ en aliaj rilatoj difini nian agadon laŭ la novaj aspektoj, alportitaj de la ŝanĝiĝoj, tiel en la kultura kiel ankaŭ en la ekonomia kaj politika vivoj. Rekonstruo do esence signifos por ni reakiri nian antaŭajn influon kaj prestiĝon kaj plie pligrandiĝi kaj plivastiĝi ilin konforme al la nova situacio. Nia laborkongreso, necesa por la ĝenerala gvidado de nia organizo, montris per siaj decidoj la saman tendencon. Unuflanke gardante tion, kio ne nur antaŭe, sed ankaŭ nun posedas sian valoron, ĝi aliflanke ne timis fronti la novajn aspektojn kaj novajn bezonojn.

En supraj reguloj ni malkaŝe konfesis, ke ni perdis terenon kaj kompare kun la antaŭmilita periodo ni ne povas estis kontentaj, sed en unu kaj tre grava rilato nia ĝenerala pozicio rimarkinde pliboniĝis. Kvankam ni tiam posedis pli da membroj, kvankam la tiamaj LE. kaj L.P. eliris sur pli bona papero kaj en pli granda amplekso, kvankam tiam ankoraŭ troviĝis en nia posedo pluraj atentindaj postenoj, perdiĝintaj en la ĥaoso, nia tiama perspektivo estis tre malvasta. Verdire ni troviĝis en ia sakstrato kaj nur nia firma konvinkiĝo povis teni nin esperantaj. Unu lando post alia trafis sub la kalkanumojn de la barbarismo, kaj ŝajne ne estis ia elirejo. Nun tio radikale ŝanĝiĝis, efektive la kontakto kun la movado en aliaj landoj ne estas jam ideala, kelkloke ĝi ankoraŭ eĉ tute mankas, sed ni povas nutri pravan esperon, ke tio ordiĝos iom post iom kvazaŭ per si mem, kiam transporto kaj trafiko ekiros pli regulajn vojojn. Italio kaj Ĉeĥoslovakio denove liberiĝis. Aŭstrio jam akiris propran demokratan registaron kaj ankaŭ el Germanio jam venas komunikoj pri reaktiviĝo de la Esperantomovado, kvankam ankoraŭ nenia kontakto estis starigita. En Hispanio kaj Portugalio ankoraŭ regas tiranoj, sed oni ne bezonos esti profeto por eldiri kun granda certeco, ke ankaŭ ilia disfalo alproksimiĝas kaj poste la entuziasmaj kaj energiaj hispanoj denove liveros sian ŝatatan kontribuon al la internacia movado, kiun ni tiom bedaŭre vidis nuligata de la Franco-faŝismo.

Kaj fine Ruslando! Antaŭ la milito ĝi pli kaj pli enfermiĝis, sed nun konstateblas diversaj signoj, esperigantaj, ke ankaŭ la rusaj kamaradoj ree aperos sur la scenejo.

Kontraŭ tiaj ĝojigaj kaj esperigaj faktoj staras ankoraŭ tio, kion ni nomis la „angla malsano", sed ni ne estos tro optimistaj, supozante, ke la mondo transvivos ankaŭ tiun hundkreskan malsanon. Kaj ni ne enviu al la lingvoinstitutoj la profiton el tiu favora konjunkturo. La eldiroj de eminenta lingvisto, kia profesoro De Boer el Leiden (vd. L.E. de nov. paĝon 34) estas tamen pli gravaj por serioza movado ol la komunuzaj frazoj de iuj diletantoj.

Estu al nia kongreso la tasko aldoni novan energion kaj pliprofundiĝi la entuziasmon kaj la fervoron por nia vere historia komisio: Triumfiĝi Esperanton, la Latinon de la Demokratio!

MEMBRONOMBRO

Nia membronombro malrapide sed progrese pligrandiĝis. Notiĝis en oktobro pas. 2.000 membroj, ni nun transpasis 2400!

Membronombro je la 31a de decembro '45a.

En 79 sekcioj	2323 m.
ĝeneralaj membroj	108 m.
Entute	2441 m.

Krom tio la membrolistoj je la 1a de januaro 1946a montras kontraste kun aliaj jaroj ne malprogreson, sed konstantecon kaj eĉ malgrandan kreskon!

Post la sekcioj nomitaj en No. 5 de L.E. fondiĝis ankoraŭ sekcioj en: Antwerpen, Breezand, Brunssum, Deurne, Kerkrade, Maastricht, Merksem, Middelburg, IJmuiden kaj Zeist. La mencio de sekcio Goes baziĝis sur eraro, sed verŝajne la printempo alportos ankaŭ sekcion en la ĉefurbo de Zuid-Beveland. Alblasserdam anoncis sian malfondiĝon je le 1a de jan. 1946a pro manko de gvidantoj, la plimulto el la membroj restos kiel ĝeneralaj membroj.

LA LABORKONGRESO.

La laborkongreso okazis je 6a kaj 7a de oktobro en konstruaĵo De Leeuw en Amsterdam. Partoprenis 260 personoj. La kongreso akceptis novan rezolucion anstataŭe de la Apeldorna Rezolucio, kiu kelkrilate malnoviĝis. La sanaj principoj de la A.R. tamen esprimiĝis ankaŭ el la nova Amsterdama Rezolucio. Plie la kongreso nomis komitaton, konsistantan el k-doj Alings, van Essen, van Haren, Kamstra kaj Spaarenberg, por esplori la Statuton kaj Regularon kaj eventuale prezenti la ideojn de la ligoformo en konkretaj proponoj, por ke la sekvonta kongreso povu oportune kaj senkonfuze decidi pri dezirindeco aŭ nedezirindeco de la ligoformo por nia organizo. Ankaŭ diversaj aliaj proponoj pri la formo de la distriktoj estis transdonantaj al la elektita komitato. Plie akceptiĝis propono de la federacia estraro fondi en kunlaboro kun la tri aliaj esperanto-asocioj tutlandan kontaktkomitaton. Kiel lokon de la sekvonta kongreso oni elektis Alkmaar.

LA ESTRARO

Laŭ elekto de la laborkongreso la estraro konsistas el: A. Veen, prez. kaj red. L.E., W. F. Kruit, sekr. kaj vicprez., J. Pouli, kasisto, A. van Haren, dua sekr., F. de Vries, propagando, C. Prins kaj H. Velthove, administracio, F. G. Kroonder, Libro-servo, kaj H. P. Schoonenberg, vicred. L.E., K-do Faulhaber partoprenis kiel honora prezidanto la kunvenojn de la estraro. La estraro kunvenis regule unufoje en dek kvar tagoj.

LABORISTA ESPERANTISTO.

Ne necesas multon aldoni al la raporto aperinta jam en la aŭgusta numero de L.E.

Aperis en pasinta jaro 7 numeroj kun entute 42 paĝoj.

Pro troa laboro en la presejo ne eblis akurate aperigi ĝin, kaj prokrasto ne ĉiam estis evitebla.

Konante la pozicion de la presejoj en la nun por ili malfacila tempo pro manko de papero kaj abundo da mendoj, ni ne povas ne esprimi nian dankon al nia presejo „Dico", kiu faris ĉion eblan por kontentiĝi nin kaj niajn gelegantojn.

Pro manko de papero, kaj por ŝpari spacon ni regule uzis pli malgrandan letertipon. Bedaŭrinde ni devas aldoni, ke la arĥivo de nia kliŝaro perdiĝis en la milito.

INTERNACIA KORESPONDADO

En novembro 1945a ni starigis novan fakon en nia organizo, nome: „La internacia korespondado".

Ni celis peri inter niaj membroj kaj korespondemuloj eksterlandaj. Komence la afero ne tiom glate funkciis, ĉar tuj post nia unua alvoko en L.E. ni estis superŝutataj per abundo da anoncoj, kvankam ni ankoraŭ ne disponis pri sufiĉe granda kvanto da eksterlandaj adresoj. Ni nur gut-gute povis helpi niajn membrojn kaj ni komprenas, ke multaj sentas sin forgesitaj. Tiel feliĉe ne estas, ni povas garantii, ke ĉiuj ricevos respondon, ni petas nur iom da pacienco.

Ni disponas nun pri sufiĉe da eksterlandaj adresoj, kaj ni estas konvinkitaj, ke ni post iom da tempo ĉiujn povos helpi.

Novajn adresojn ni eĉ povas atendi, sed ne forgesu aldoni poŝtmarkon por la respondo. *Serĉu kontakton kun viaj eksterlandaj gekdoj! Pruvu la uzeblecon de nia lingvo!*

A. van Haren

EKZAMENA KOMITATO.

Nederlanda Katoliko kaj N.C.E.V. (Ned. Kristana Esp. Asocio) akceptis proponon de L.E.E.N. kaj F.L.E. aliĝi al la ekzamena komitato, sur bazo de kelkdetale modifita Interkonsento. La ĉefa koncesio de L.E.E.N. kaj F.L.E. konsistis en la neokaziĝo de ekzamenoj je dimanĉo, tamen ni rezervis al ni la rajton post unujara praktikado rekonsideri la situacion. Ekzamenoj povos okazi dum ĉielirtaĝo. Je la 9a de febr. proks. la Ekz. Kom. kunvenos laŭ sia nova konsisto. K-doj Degenkamp, Faulhaber kaj Kruit reprezentos F.L.E. Ĉi loke ni deziras esprimi al k-doj Velthove kaj Van Scheepen la dankon de nia organizo pro la akurata kaj devokonscia maniero, en kiu ili reprezentis nian asocion en la komitato de L.E.E.N. kaj F.L.E.

NEDERLANDA CENTRA KOMITATO ESPERANTISTA

Laŭ propono de F.L.E. fondiĝis N.C.K.E., konsistanta el po du reprezentantoj de Ned. Kat., N.C.E.V., L.E.E.N. kaj F.L.E. La celo de la komitato estas: reprezenti la nederlandan esperantistaron antaŭ ŝtataj kaj publikaj instancoj kaj okupi sin pri ĉiuj laboroj, komunaj al la kvar asocioj. La estraro konsistas el A. Veen, prezidanto; A. F. Leideritz Jr. (Vechtstraat 5², Amsterdam) sekretario-kasisto kaj J. D. Brakel, Mr. A. J. Kalma kaj L. G. C. de Jong.

PROPAGANDO

Kvankam diversaj cirkonstancoj influis malfavore, ni sukcesis eldoni novan broŝuron „Esperanto juist nu!" verkitan de k-do van Haren, kaj novan fenestroafiŝon.

Cetere ni ankoraŭ povis uzi malgrandan kvanton da propagandiloj, devenantaj el la antaŭmilita periodo.

SKRIBA KURSO

Por kontentiĝi certan bezonon ni komencis la eldonadon de skriba elementa kurso sub gvido de k-doj Van Lier kaj Kuyt. Pro la jam progresinta sezono ne eblis plu aranĝi iom grandskalan reklamon por la kurso, ni devis kontentiĝi per anoncoj en regionaj gazetoj, precipe tie, kie ni ne havas sekciojn. Pluraj planoj por skribaj kursoj estas projektitaj. Nia intenco estas eliri en septembro proksima kun skribaj elementa, A- kaj B-kursoj.

*) Jus ni estas invititaj de V.A.R.A. paroladi antaŭ la mikrofono. Red.

De la gazetarservo

★

En la 6 monatoj, en kiuj nia Federacio denove libere povis funkcii, ni komprenehle propagandis. Ĉar la monrimedoj ne sufiĉis, ni devis multon lasi al la sekcioj kaj la membroj. Kaj ili atingis iagradan sukceson ĉe la gazetaro. Sed en la venonta jaro ni devos pli fervore prilabori tiun terenon. Tiom longe, kiom iu redakcio skribas:

„Dat nu juist Esperanto deze (gemeenschappelijke) taal zou moeten zijn is een begrip dat nogal eens wordt bestreden en waarover men het nog lang niet eens schijnt te zijn.

Indien wij nu in ons blad Esperanto gaan populariseren, betekent dit, dat wij in deze kwestie stelling nemen. En aangezien over dit punt eerst ook in onze rijen overeenstemming behoort te zijn, geloven wij dat het beter is, hiermede te wachten, totdat inderdaad een standpunt hierover is ingenomen(!)"

(Red. Werkend Nederland E.V.C.)

tiom longe estas necese, ke ni per trafaj argumentoj, per novajoj superŝutu la gazetaron. Helpe de vi ni povos fari tion. Se vi ricevos sciindajojn el eksterlando pri kia ajn temo, sendu ilin al nia gazetarservo.

Por glata kaj racia funkciado de tiu servo estas dezirinde, ke oni en la sekcioj kaj distriktoj nomu perantojn por la gazetarservo. En la urbaj distriktoj la sekcioj povos lasi tiun laboron al la distriktestraroj. Ankaŭ la helpo de la ĝeneralaj membroj estos tre bonvena. En lokoj, kie loĝas pli ol unu ĝenerala membro, ili elektu inter si iun, kiu povas prizorgi la gazetaron.

La gazetperantoj kolektu la adresojn de la en iliaj loĝlokoj aŭ regionoj aperantaj gazetoj kaj jurnaloj. Se de la gazetarservo venas artikoloj, novajoj aŭ anoncoj, ili klopodu enpresigi ilin. Se en iu gazeto aperas artikolo, novajo aŭ anonco pri, por aŭ kontraŭ internacia lingvo, ili sendu tiujn al la gazetarservo. Ni taksu tiun laboron ne tro facila, ĉar ni intencas regule provizi la gazetaron per novajoj kaj artikoloj. Ĉi sube vi trovos liston de gazetoj, en kiuj ni trovis artikolojn, sciigojn kaj anoncojn pri, por kaj kontraŭ la ideo de internacia lingvo.

De Luistervink 1 x; De Nieuwsbode 1 x; De Vrije Pers 1 x; De Waarheid: (Enschede) 1 x, (Den Haag) 1 x (nur anonco), (Leeuwarden) 1 x, (Meppel) 1 x, (Utrecht) 1 x (nur anonco); Haarlems Dagblad 1 x; Halfwegse Courant 1 x; Het Parool: (Amsterdam) 1 x (kaj anonco), (Groningen) 3 x, (Den Haag) 1 x (kontraŭ-Esperanto), (Leeuwarden) 2 x, (Zwolle) 2 x; Het Vrije Volk: (Amsterdam) 1 x plus anonco), (Apeldoorn) 1 x, (Den Haag) 1 x nur anonco), (Leeuwarden) 2 x, (Zwolle) 1 x; Leeuwarder Koerier 3 x; Nw. N.-H. Dagblad 1 x; Veluwe- en IJsselbode 1 x; De Gids 1 x; De Vlam 5 x; Grafisch Weekblad 2 x; Ons Orgaan Spoorgroep E.V.C. Esperanto-kolono; Spartacus Esperanto-kolono kaj The Liberator 1 x.

El tio montriĝas, ke en la grandaj urboj la grandaj gazetoj ne enpresigis ion pri nia movado. Ili estu certaj, ke ni ne forgesos ilin. Specialan dankon meritas De Vlam kaj Het Parool-Groningen, kiuj resp. 5 x kaj 3 x akceptis tre grandajn artikolojn. Al la k-doj laborantaj por la Esperantokolonoj en Ons Orgaan kaj Spartacus ni promesas, se ili deziras, nian helpon.

Estontece ni donos ĉiumonate sciigojn pri la gazetarservo. Zorgu ni ĉiuj, ke la listo estu longa minimume unu kolonon de L.E.

F. d. V.

(Se spaco permesos. Red.)

NOVA LERNOLIBRO

Kamaradoj aŭ grupoj, kiuj interesiĝas pri la nova lernolibro priskribita en la decembra numero de L.E., povas ricevi ciklostilitan ekzempleron kontraŭ alsendo ƒ 1.50 al G.P. de Bruin, Preangerstraat 35, Enschede

LA BULGARA ESPERANTISTARO ANTAŬPOSTENO EN LA KONTRAŬFAŜISMA BATALADO.

La faŝisma diktatoreco en Bulgario jarojn post jaroj sufokadis ĉiun provon de la popolo al libera materiala kaj kultura kreado. Pli ol dudek jarojn al la bulgara popolo estis forprenita la eblo libere esprimi sian opinion rilate gravajn problemojn de la ŝtatestrado, elekti la verajn popolajn elektitojn kaj preni sian sorton en propaj manoj.

Por reteni la kriman regadon de unu grupo el perfiduloj, koruptuloj kaj banditoj, la senhonoraj reĝimoj de la pasinteco, precipe en la lasta periodo de la faŝisma diktatoreco, uzis la plej brutalajn metodojn, la plej kruelajn rimedojn por turmentadi la kuraĝajn popolajn batalantojn.

Sed malgraŭ ĉio la tiranoj-regantoj ne sukcesis rompi la bataleman volon de la popolo. La laborulaj amasoj — laboristoj, kamparanoj kaj honestaj inteligentuloj — donis el siaj vicoj kuraĝajn kaj sindonajn popolajn gefilojn, kiuj kreis la gloran ribelan popolliberigan armeon.

En la movado de la popola kontraŭstaro partoprenis amase kaj plej diversforme la tuta bulgara popolo: la partizanaj militantoj, la unuiĝitaj politikaj partioj sub la standardo de la partia fronto, la antifaŝistaj agantoj de la ekonomia fronto, la kultura kampo.

Por la honoro de la bulgara esperantistaro necesas substreki la aktivan partoprenon de multaj esperantistoj en ĉi tiu popola batalado por la politika, ekonomia kaj kultura liberigoj el la jugo de faŝismo.

Ne povis esti alimaniere konsiderante, ke ĉiuj honeste pensantaj esperantistoj ĉie tra la tuta mondo nur povas esti humanistoj. La ideo pri internacia lingvo, kies plej sukcesa realigo estas la genia verko de la granda homamanto d-ro Zamenhof, per si mem kontraŭbatalas la faŝismon de kiu ajn speco.

Tial la esperantistoj, kiel ĉie tra la tuta mondo, tiel en nia malgranda patrujo, donis unujn el la antaŭaj plej kuraĝaj kaj sindonaj batalantoj kontraŭ la faŝismo. Pro tio la esperantistoj en Bulgario donis grandan nombron da viktimoj de la blanka teroro kaj faŝisma juĝado — dekoj kaj centoj da esperantistoj estis internigataj kaj juĝataj al longjara malliberigo pro sia pionira popolutila agado. Tial en la vicoj de la esperantistaro nun mankas tiuj kuraĝuloj, kiuj kun armilo en la mano leviĝis defendi la popolajn rajtojn kaj liberon kaj falis en neegalan lukton kontraŭ la kruela popola malamiko.

Ankoraŭ malmultaj estas la informoj pri la viktimoj en la Esperanto-movado de Bulgario. Necesas ankoraŭ multe da tempo por ekscii la proksimuman nombron de la bulgaraj esperantistoj, kiuj aktive batalis kontraŭ la faŝismo kaj pereis en tiu ĉi batalo. Tamen estas sufiĉe nur foliumi la organon de B.E.A. „Internacia kulturo" por prezenti al si kiel akra estis tiu ĉi batalo. Vi legas pri la talenta esp. redaktoro Angel Ivanov, kiu estis mortbatita en malsanuleja aresto; pri la laboristo Nikola Ŝopov, kiu, kondamnita al mortpendigo, ĝis la lasta horo de sia vivo pridiskutis kun siaj esp. amikoj en la malliberejo lingvajn demandojn. Vi legas ankaŭ pri la komandanto de partizana taĉmento „Koco Ĉistemenski", inside murdita de la faŝistaj brutoj. Vi estos surblovitaj de la heroa ago de junulo Jovĉo Petkov, kiu, militservante en la faŝista kazerno, helpis al la popolaj ribelantoj kaj antaŭ ol oni mortpafis lin kriis al siaj murdistoj: „Vi min mortigas, sed la aferon por kiu mi mortas vi ne povas mortigi. Miaj kamaradoj venĝos pro mi!"

Sed ĉe la nova popola reĝimo de la patria fronto, kiu garantias al la bulgaraj civitanoj ĉiujn rajtojn kaj liberojn, por la Esperanto-movado en Bulgario, aperas grandegaj, preskaŭ senlimaj eblecoj. Ĉiuj baroj, kiuj ĉe la reĝimo de la faŝisma diktaturo malhelpis la popoutilan agadon de la esperantistoj, estas jam forigitaj. Nia samideanaro nun povas libere disvastiĝi kaj sukcesplene uzi la lingvon de la estonta kultura homaro, servi plenforte al la spirita leviĝo de la bulgara popolo en kunlaboro kaj solidareco kun la balkanaj popoloj kaj ĉiuj liberamantaj popoloj.

Sofio, 6 Januaro '46 Vitali Julzari.

Examen-uitslagen

Amsterdam, 21 October 1945.

Aangemeld voor examen B, 3 candidaten, opgekomen 3, geslaagd 3:

Mej. A. H. I. Bosscher te Haarlem en de heren A. G. Dekker te Arnhem en H. J. Wielinga te Haarlem.

Aangemeld voor examen A, 23 candidaten, opgekomen 20, geslaagd 13:

Mej. N. Leereveld te Blaricum en de heren H. Hoen, J. A. Visser, J. de Roest, A. Korff en D. Appel, allen te Amsterdam, L. Nater te Den Helder, P. Cley en J. Schrage te Groningen, G. B. Noothoven-v. Goor te Arnhem, H. Volkert te Hengelo, G. H. Beinema te Eindhoven en A. L. Kaljee te Zuilen.

Den Haag, 27 October 1945.

Aangemeld voor examen B, 3 candidaten, opgekomen 2, geslaagd 1:

G. Kalkman te Vlaardingen.

Aangemeld voor examen A, 6 candidaten, opgekomen 5, geslaagd 5:

Mej. P. Oosthoek te Rotterdam en de heren L. B. Roelofs te Naaldwijk, A. P. M. Lafeber te Gouda, W. Singer te Delft en J. v. Bennekum te Giessendam.

NEKROLOGO

Jus ni ricevis de nia sekcio Den Haag la informon, ke subite mortis pro kormalsano nia kamarado

G. J. WORST

aktiva ano de nia Federacio kaj estrarano de la distrikto Den Haag.

Fed. estraro.

BETUIGINGEN VAN INSTEMMING.

Het federatie-bestuur verzond de volgende brief aan het Comité Vrij Spanje:

Comité Vrij Spanje.

De Federatie van Arbeiders-Esperantisten stelt er prijs op u instemming te betuigen met uw streven en de wens uit te drukken, dat Meeting Markthallen moge bijdragen tot bevrijding onzer Spaanse kameraden.

Fed. v. Arb. Esp.

Aan den Minister voor Overzeese gebiedsdelen zond het Fed. Bestuur het volgende telegram:

Zijne Excellentie Prof. Logeman.
Den Haag.

De Federatie van Arbeiders Esperantisten wenst U zijn instemming te betuigen met het streven van de regering om de Indonesische-kwestie tot een vreedzame oplossing te brengen zonder gebruik van geweld.

A'dam, 31-12-1945.
Fed. van Arb. Esp.

AL F.L.E.-ANOJ!

Tre ŝatataj samideanoj, geamikoj!

Tutkore mi bonvenigas vian reviviĝon kaj deziras al via laboro plenan sukceson! Ofte mi pensis al vi — kion vi eble perdos dum tiu terura tempo de mallumo! Mi funebras kun vi pro la perdo de multaj bravaj samcelanoj. Ni, kiuj restis, des pli fervore laboros por la venko de la tutmonda paco!

Saluton al vi ĉiuj,

Praha, 28-12-1945. J. Ŝupichová.

Raporto de la regularkomitato

Ni povis agi laŭ du manieroj, nome: trakti la kongresproponojn kaj -dezirojn, kaj doni nian opinion kaj konsili pri la principoj, nome: ĉu la strukturo de nia Federacio estu ŝanĝata, tiel ke ĝi fariĝu asocio kun strukturo centraliza, kaj kiun tendencon ĝi havu. Cetere suficus aldoni konsilojn pri precipaj kaj principaj ŝanĝoj en Statuto kaj Regularo.

Opiniante, ke la plimulto en la Federacio pro oportunaj motivoj deziras ian pli centralizan sistemon, dum la alia parto tamen ne estas kontraŭ, se certaj „memstareco-principoj" ne estas oferitaj, kaj ne ludas rolon „partiaj" direktoj, la Regular-Komitato do, post interdiskutado pri la diversaj proponoj kaj deziroj, agis laŭ alia metodo. Ĝi fiksis novan Statuton kaj novan Regularon laŭ la principoj, kiujn ĝi konsilas al la sekcioj profunde pritrakti, dum ĝi esperas, ke ili en la kongreso sen troa diskutado povos esti akceptataj. Ĝuste tial, ke ni venas kun klara koncepto, en kiu tamen ĉiuj „direktoj" retrovas sian deziron, ne bezonas esti miskompreno pri postaj malklarajoj.

La malplimulto en la komitato ne aparte raportos. Laŭ tradiciaj motivoj ĝi deziras, ke la Federacio restu tia, kia ĝi estis. Ĉar tamen ĉiujare venis, kaj denove venus, „Regularŝanĝo-proponoj" ankaŭ la malplimulto plenvole kunlaboris kaj, ĉar nur kelkaj ŝanĝoj ne kontentigus, prizorgis sian parton en la projektoj, frukto do de harmonia kunlaboro.
Sekve nia komitato projektis skemon por distrikto- kaj sekcio-regularoj, kiujn ĝi rekomendas enkonduki post akcepto de la nova statuto-regularo de nia organizo.

Post akcepto, krom la strukturo, principe nenio ŝanĝiĝos en la karaktero de nia organizo. Ĝi restos samtendenca. Tendenco, kiu tamen ne per kelkaj vortoj estas priskribebla. Ni kiel esperantistoj ĝin sentas. En la artikolo 2a de la proponita Statuto ni provis ĝin skizi, dum en la nomo ni konservis nian ĝeneralan laborkampon laŭ nia deveno: esti laborista! Ĝi tamen fiksas nian ĉefan laborkampon kaj nian celon. Nur ne povas resti tiu parto, de nia organizo-nomo, kiu fariĝis al nia kara, ĉar ĝi enkorpigis en si la apartan idealon, kiu inspiris nin, kaj ĉiam denove aktivigis, sed ne plu respondecis al nia organizformo, nia „Federacio".
Ĉi tiu nomo, la unuan de majo en la nuna jaro, same kiel nia Federacio, atingis la aĝon de 35 jaroj. Laŭ homaj mezuroj aĝo plenmatura kaj por agi saĝe kaj prudente. Ni, homoj, formas tiun organizon, kiel esperantistoj celante tute apartan idealon, plenan je entuziasmo. Kune ni havas la mezan jaraĝon de 35 jaroj. Aĝu ni laŭ ĝi. Estu la decido saĝa kaj valoru por multe da jaroj, por ke estontaj kongresoj povu esti ankoraŭ pli fruktodonaj. Kia ajn estu la decido, en la proksimaj jaroj almenaŭ ne revenu tiaj ŝanĝproponoj.
Estu nia devizo: Sub alia nomo, sed sub la sama flago!

La Regularkomitato:
H. W. Alings.
C. van Essen.
A. F. v. Haren
R. Kamstra.
L. Spaarenberg

STATUTEN

A. NAAM EN ZETEL.

ART. 1. De bond van arbeiders-esperantisten in het gebied van de Nederlandse taal, genaamd: Asocio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo is gevestigd te Amsterdam. Hij wordt in de statuten aangeduid als „de bond".

B. DOEL EN MIDDELEN.

ART. 2.. De bond stelt zich ten doel de verbreiding van de international taal Esperanto onder de arbeiders in het gebied van de nederlandse taal. De bond is een culturele socialistische organisatie op democratische grondslag.

ART. 3. De bond tracht zijn doel te bereiken langs wettige weg door:
a. verspreiding van propagandageschriften over Esperanto;
b. het beleggen van propaganda- en cursusvergaderingen voor Esperanto;
c. het zoeken van aanknopingspunten en het organiseren van cursussen in plaatsen, waar geen afdeling van de bond bestaat;
d. het uitgeven van periodieken uitsluitend aan de organisatie en Esperanto gewijd;
e. het zoeken en onderhouden van betrekkingen met buitenlandse zusterverenigingen en het bevorderen van het internationaal gebruik van Esperanto door niet-Esperantistische organisaties der arbeidersbeweging;
f. alle andere wettige middelen welke nuttig worden geacht voor de verbreiding van de internationale taal Esperanto.

C. HET LIDMAATSCHAP.

ART. 4. De bond bestaat uit:
a. gewone leden;
b. algemene leden;
c. sympathiserende leden;
d. sympathiserende leden-organisaties.

ART. 5. Men wordt lid van de bond:
a. door zich aan te sluiten bij een afdeling;
b. door zich aan te melden bij het bondsbestuur als algemeen lid, indien in of nabij de plaats der inwoning geen afdeling is;
c. het sympathiserend lidmaatschap wordt verkregen door aanmelding bij het bonds- of afdelingsbestuur.
Onderhandelingen over aansluiting van clubs geschieden door de in het huishoudelijk reglement genoemde instanties.

ART. 6. Het lidmaatschap eindigt:
a. door overlijden van natuurlijke personen, ontbinding of verlies van rechtspersoonlijkheid van rechtspersonen;
b. door bedanken aan de afdeling waartoe men behoort of, als algemeen lid, aan het bondsbestuur;
c. door royement.
Personen, geroyeerd wegens handelingen tegen Esperanto, of zulke die de groei der afdeling belemmeren of haar voortbestaan in gevaar brengen, kunnen niet als lid door een andere afdeling worden opgenomen. Zij hebben beroep op de instanties, genoemd in het reglement.

ART. 7. Ontbinden van een afdeling en royement van leden wordt door het bondsbestuur voorgesteld op grond van:
a. handelingen, welke de bond en zijn doelstellingen schaden;
b. de niet-nakoming van financiele verplichtingen.

D. VAN DE AFDELINGEN EN DISTRIKTEN.

ART. 8. De leden vormen afdelingen in de verschillende plaatsen waar zij woonachtig zijn, waartoe ook gerekend kan worden de omgeving.
De afdelingen zijn zelfstandig in haar inwendige organisatie en plaatselijke actie, in alles, wat niet door de bond of het district geregeld is.
In plaatsen of provincies, waar meer dan één afdeling gevestigd is, vormen deze tezamen een plaatselijk of provinciaal distrikt.

E. VAN HET BESTUUR.

ART. 9. Het bondsbestuur bestaat uit tenminste 5 leden, wier functies bepaald zijn in het huishoudelijk reglement. Zij worden gekozen uit en door de leden, op een wijze, als in het huishoudelijk reglement is aangegeven.

F. VAN DE GELDEN.

ART. 10. De inkomsten van de bond bestaan uit: :
a. contributies;
b. andere baten.

G. VAN DE ALGEMENE VERGADERING.

ART. 11. De bond houdt elk jaar zijn congres, waarheen iedere afdeling het recht heeft één of meer afgevaardigden te zenden.
De bond is door het bestuur vertegenwoordigd.
Het congres behandelt de door het bondsbestuur gegeven jaarversalgen, en de door het bestuur en afdelingen op de beschrijvingsbrief gebrachte punten. Over alle behandelde punten wordt gestemd. Slechts de op het congres vertegenwoordigde afdelingen en algemene leden zijn tot stemmen gerechtigd.

H. ORGAAN.

ART. 12. Ieder lid van de bond heeft recht op een exemplaar van het bondsorgaan.

I. VAN DE STATUTEN.

ART. 13. Wijzigingen en toevoegingen in de statuten zijn overgelaten aan het congres en treden niet in werking ,alvorens daarop de koninklijke goedkeuring is verkregen. In zaken, waarin deze statuten en het huishoudelijk reglement niet voorzien, beslist het bondsbestuur, met verantwoording aan het congres.

J. DUUR VAN DE BOND EN LIQUIDATIE.

ART. 14. De bond is aangegaan voor de duur van 29 jaren te rekenen van de dag van zijn oprichting, zijnde 1 Mei 1911. Bij het verstrijken van genoemd tijdvak wordt de vereniging opnieuw aangegaan voor de tijd van 21 jaren, alzo eindigende 30 April 1961.
ART. 15. Tot ontbinding van de bond kan slechts worden overgegaan, wanneer de bond geen bestaansrecht meer heeft.
ART. 16. Bij de liquidatie vervallen de bescheiden van de bond aan een door de opheffingsvergadering vast te stellen vereniging, na vooraf te hebben voldaan aan de bepalingen van het Burgerlijk Wetboek.

K. VAN HET BOEKJAAR.

ART. 17. Het verenigingsjaar loopt van 1 Januari tot 31 December.

HUISHOUDELIJK REGLEMENT.

Verschijnt in volgend L.E. De afdelingsbesturen zullen binnenkort een afdruk van het H. R. ontvangen.

VERSLAG 1945

Algemene Nederlandse Esperanto Examen Commissie

Voorzitter van de examencommissie was de heer H. Velthove

Vice-voorzitter: Mr. A. J. Kalma.

Secr.-Penningmeester: H. M. Mulder.

Commissie-leden: de heren G. J. Degenkamp, J. van Scheepen, W. F. Kruit, F. Faulhaber, A. Pascha, F. Weeke, E. Koot.

Examinatoren voor F.L.E.: Mevr. H. Oudenhoven-Bishoff en de heren G. P. de Bruin, R. Israëls, C. J. Coppens, H. F. W. Nieweg, J. W. Prent, B. Wels.

Voor L.E.E.N.: de dames S. H. J. Blok, J. W. Woutersen, G. H. Benink en de heren C. Govers, H. Bakker, P. Korte, R. J. Kuiper.

Reeds tijdens de oorlog, vooral gedurende de laatste maanden wachtte de Esperanto-Examen-Commissie het ogenblik af, waarop haar werkzaamheid zou kunnen worden hervat. De commissie was van mening, dat hetzelfde ongeduld de ware Esperantisten zou beheersen, en wij durfden veronderstellen, dat velen hun studie tijdens de oorlog hadden voortgezet.
Daarom besloten wij reeds in 1945 twee examens te organiseren: 21 October in Amsterdam en 27 October in Den Haag, in de hoop, dat een behoorlijk aantal candidaten zich zou aanmelden.
En het resultaat was werkelijk bevredigend. Voor het examen te Amsterdam meldden zich aan: 3 B- en 23 A-candidaten. Opgekomen: 3 B- en 20 A-candidaten. Geslaagd: 3 B- en 13 A-candidaten.
Voor het examen te Den Haag meldden zich aan: 3 B- en 6 A-candidaten. Opgekomen: 2 B- en 5 A-candidaten. Geslaagd: 1 B- en 5 A-candidaten.
Onze commissie bezat natuurlijk absoluut geen geld en was enigszins bezorgd over de financiële zijde der zaken. Maar ook dat kwam in orde.
In Amsterdam kregen we de examenzaal kosteloos en in Den Haag zeer goedkoop.
Drukkosten hadden we in het geheel niet, want de heer Kalma verzorgde kosteloos alle examentaken, puntenlijsten, enz.
Zo komt het, dat, ofschoon noch F.L.E., noch L.E.E.N. enig voorschot gaven over het jaar 1945, onze kas toch sluit met een aardig saldo.

KASSTAAT — JAAROVERZICHT.

		Debet	Credit
Amsterdam: Examengelden	f 84.—		
Onkosten ..	f 15.50	f 68.50	
Den Haag: Examengelden	f 25.—		
Onkosten ..	f 18.94½	f 6.05½	
Drukkosten			f 2.—
Postzegels en telef.			f 12.17½
Diverse onkosten ..			f 1.20
Saldo 1945: Kas ..			f 57.14
Postzegels			f 2.04
		f 74.55½	f 74.55½

De secr.-penningmeesteresse:
H. M. Mulder.

ROTERDAMA S.A.T.-RONDO

La 24an de februaro parolados k-do C. Coppens pri **Eŭropo kiel politika problemo.** Ĉi foje la kunveno okazos en Rusthoflaan 53. Komenco je la 1.30 precize. La antaŭan kunvenon ĉeestis pli ol 100 personoj. Zorgu, ke vi ĉi foje estos inter la ĉeestantoj.

La Batalo Kontraŭ la Akvo

Laborante por la senakvigo de Walcheren, nome ĉe la lasta fermigota truo apud Rammekens, mi emas klopodi por priskribi tiun grandiozan laboron. Kiam la digo estis detruita, diversaj instancoj komencis interkonsiliĝi pri la riparo aŭ rekonstruo.
Montriĝis, ke la digo estis tiel trafe bombardita, ke nu plu eblas ripari ĝin kaj ŝtopi la truojn. Oni decidis konstrui novan digon malantaŭ la malnova[1]).
Estas malfacilega laboro, ĉar la maro estas kontraŭ-ema, kaj ĝian forton oni ne subtaksu. Dufoje en unu tago la akvo fluas tra la truoj, en ĉiu minuto proksimume dekkvar miloj da hektolitroj, kiam la nivelo estas plej alta. Vi do komprenas, ke pro tiuj rapidfluoj novaj sulkoj kaj truoj estiĝas.
Kiel oni nun laboras por konstrui novan digon?
Oni ĵetas multajn ŝtonojn kaj ŝtonegojn en la plej profundajn sulkojn, kaj alfundiĝas plektajojn, faritajn de specialaj laboristoj, tiel firme fiksiĝas unu tavolo sur alian. Fine oni povas vidi, kiam la akvonivelo estas plej malalta, la supron de la ŝtonegoj super la akvo. Kia ĝojo! Sed ho ve, en nia lando ne estis sufiĉe da materialo por tiu giganta laboro. Niaj malamikoj, la germanoj, ja rabis ĉion. Oni turnis sin al la angla armeestraro: „ĉu estas eble, ke ni por la senakvigo de Walcheren, povos uzi „caissons" kaj „beetles"?" Ĝi volonte havigis ilin al ni. Sed kio estas „caissons" kaj „Beetles"? vi eble demandas. Ili estas konstruitaj el betono, kaj oni uzis ilin dum la invado en Normandio. „Caissons" estas longa 65, alta 12 kaj larĝa 13 metrojn. Vi komprenas, ke tiaj betonblokoj bonege taŭgas por la konstruo de la digo.
Mar-trenŝipo trenas ilin al la ĝusta loko, kaj tiam oni alfundigas ilin. Oni ankaŭ uzas ŝipojn, konstruitajn laŭ ordono de la germanoj. Kaj nun la „beetles". Ili estas malgrandaj „Caissons", kaj oni uzas ilin por la plej malgrandaj truoj.
Arganoj poste ĵetas argilon por ŝtopi la spacojn inter la blokoj, dume la laboristoj okupas sin pri la konstruo de la digo.
Sur la maro troviĝas grandaj maŝinoj. Tri el ili suĉas sablon el la maro, kaj ŝarĝas per ĝi grandajn ŝipojn, kiuj transportas sian enhavon al aliaj maŝinoj, kiuj siavice, miksante la sablon kun akvo, premas ĝin tra tubegoj al la difinita loko. Daŭre la sablo plialtiĝas, sed laŭ nia ideo tre malrapide. Arganoj ĵetas ĝin plialten. La digo pli kaj pli pretiĝas.
La digon oni komencas kovri per argilo. Ĝi preskaŭ estas preta. Sed .., ho ve! La meteorologia instituto mencias: „Atentu, atentu! Ni atendas ventegon el nord-okcidento; ventoforto 5 aŭ 6, kaj de tempo al tempo 7 aŭ 8." Kun timo ni atendas. Fajfante la ventego anoncas sin. La maro fariĝas pli kaj pli furioza. La ondoj pli kaj pli altiĝas kaj torente ĵetas sin sur la novan digon, kiun ni pretigis. Ho, kia fortego... Ni volas fronti la teruran ventegon kaj alportas sakojn da sablo, kaj ĵetas ilin en la truojn, kiujn la akvo denove batis en la digon. Ni time demandas nin „ĉu ni sukcesos, aŭ ĉu la maro venkos. Ankaŭ la arganoj venas por helpi nin. Ni koncentras nin ĉe la plej minacataj lokoj. Estas la kulmino en la batalo de la homoj kontraŭ la maro. „Atentu, tie estiĝas nova truo!" Rapide la arganoj estas turnitaj tien kaj ĵetas argilon en la truon por ŝtopi ĝin.
Denove kaj daŭre torentas la furiozaj ondoj sur la digon. La marakvo nun timige altiĝas. Pli ol 1.70 metrojn super la ordinara nivelo. Ŝajne la infero malfermas sin antaŭ ni. Ŝtonegojn, kiuj pezas unu milon da kilogramoj la furiozanta marakvo forĵetas de iliaj lokoj. Kaj ni, homoj, klopodas, helpate de nia ilaro kontraŭstari la maron....
Vane, ni ne sukcesas en kiu ajn de niaj klopodoj. La truo pli kaj pli larĝiĝas. Denove la akvo fluas tra la rompita digo en la polderon. La „caissons" kan la „beetles" ekmoviĝas, kliniĝas kaj malaperas en la sulkon.
Du-tri horoj sufiĉas por senvalorigi la laboron de kvin aŭ zes semajnoj, por forviŝi kion nia dezirvolo kaj penegado konstruis... kiel bagatelaĵon.
Kun amaro ni rigardis la detruon, sed tamen nia tempo ne perdiĝis. Altvalora estas la devizo de ni, zeelandanoj: *Luktante ni venkos*[2]). Ni daŭrigas, por ke la loĝantaro de Walcheren denove povu loĝi en siaj domoj[3]).
Rammekens, Januaro 1946. F. de Vries.

1) Walcheren estas insulo en la provinco Zeeland, la sudokcidenta parto de Nederlando. Okaze de la liberigaj bataloj, anglaj bombaviadiloj detruis la digon. Pro tio granda parto de la insulo subakviĝis.
2) Devizo sur la blazono de Zeeland (Luctor et emergo).
3) En la gazetaro jus aperis la komuniko, ke la digo denove estas preskaŭ finkonstruita, kaj feliĉe eltenis la ventegon de la 28a de januaro. Red. L.E.

Bestuursmededelingen

ONS 27STE CONGRES.

Het is thans zeker, dat ons 27ste congres in Alkmaar zal plaats vinden. De toestemming van het gemeentebestuur is afgekomen. In de aula van het gymnasium zullen de congresgangers bijeenkomen. Een unieke gelegenheid. Men treffe reeds thans de maatregelen om te kunnen deelnemen. De tijd van voorbereiding is tengevolge van de omstandigheden kort. Het is daarom gewenst, dat het O.K.K. binnen korte tijd een opgave krijgt van het aantal leden, dat van plan is aan het congres deel te nemen. Verder zie men de mededelingen van het O.K.K.

CONGRESVOORSTELLEN.

De voorstellen voor het congres moeten uiterlijk 15 Februari a.s. in ons bezit zijn; de amendementen 15 Maart a.s.

Het is gewenst voor eventuele voorstellen rekening te houden met de besprekingen en besluiten van het congres in October j.l., zodat men herhaling of overbodige discussies voorkome.

BESTUURSVERKIEZING.

De bestuursleden zijn herkiesbaar, uitgezonderd k-doj Schoonenberg en Kroonder.
Candidaatstellingen moeten, ondertekend door voorzitter en secretaris van de afdeling, vergezeld van de bereidverklaringen der resp. candidaten, uiterlijk 15 Maart a.s. in ons bezit zijn.

POSTBUS.

Men houde er rekening mede, dat de Federatie wederom een postbus heeft. Alle correspondentie gelieve men dus van heden af te richten aan F.L.E., postbus 8002, Amsterdam-West.

LA PROGESANTO

Het eerste na-oorlogse nummer van L.P. is verschenen. Werft thans abonné's!

LABORISTA ESPERANTISTO

Het volgend nummer van L.E. verschijnt begin Maart. Copy gelieve men vóór 20 Februari in te zenden.

VOOR ONZE BELGISCHE LEDEN.

Onze leden en abonné's in België worden verzocht contributies enz. te voldoen aan k-dino C. de Cock, Scheeplosserstraat 21, Gent.

FEDERATIE-RAADSVERGADERING

De Fed.-Raadsvergadering zal plaatsvinden op Zaterdag en Zondag 6 en 7 April a.s. te Amsterdam. Nadere mededelingen omtrent plaats van bijeenkomst enz. zullen later bekend worden gemaakt.

Uit de afdelingen

AFD. AMERSFOORT

La estraro de sekcio Amersfoort „Verda Stelo" esperas por la nova jaro, ke ĉiu konas sian devon pligrandiĝi nian sekcion, kaj deziras al ĉiuj niaj anoj prosperan jaron.

Le estraro.

AFD. ARNHEM

Secr.: Agnietenstraat 90

La 20an de decembro, ni memorigis Dr.o Zamenhof en kunlaboro de sekcio de L.E.E.N. Estas ĝojiga fakto, ke jam la unua tut-arnhema Esperantokunveno post la fino de la milito tiel bone sukcesis. La salono estis tute plena, kiam k-do Henstra nia prezidanto malfermis la kunvenon. La programo estis varia. Ni i.a. prezentis deklamadon de k-dino Henstra-Schiphorst kaj kelkajn teatraĵetojn, luditajn de la teatrogrupo.
La sekcio de L.E.E.N. ĉarme prezentis kelkajn teatraĵetojn, tre interesan pianludadon kaj deklamadon de André Dekker kaj memorigan paroladon pri D-ro Zamenhof de S-ro Willemsen, la prezidanto. S-ro Van Zeijl faris malgrandan memorigan parolandon pri S-ino Jongbloet. Dum la paŭzo estis okazo por mendi librojn. Ni vidis dum la vespero kelkajn antaŭajn anojn de nia sekcio. Pro la vespero ni enskribis 2 novajn anojn. Ni daŭrigos la kunlaboron kun L.E.E.N. en loka komitato.

P. R.

AFD. AMSTERDAM V

Secr.: Marco Polostraat 64 I

La lastan kunestron en la jaro 1945 ni uzis por membro-kunveni. En ĝi la membroj akceptis estrarproponon, por fondi ŝparkason, serve al ĉiuj anoj, kiuj deziras viziti la estontajn kongresojn. Ni decidis, ke ĉiu partoprenonto rajtu ŝpari ĉiusemajne tiom, kiom la koncernato volas malhavi tiucele. Laŭdezire oni povos destini la ŝparotan monon tiel por la federacia, kiel ankaŭ por estonta S.A.T.-kongreso. Per tio ni jam nun estas certaj, ke precipe la federacia kongreso estos multnombre vizitata.

Sekretario

AFD. DEURNE ANTWERPEN

Secr.: Daenenstraat 25, Berchem

Jam forpasis ok monatoj, depost kiam la V bomboj detruis grandan parton de la belega urbo Antwerpen.
Nia grupo reviviĝis kaj intencas aranĝi internacian letervesperon en la monato februaro. Ni dissendis cent dudek kvar poŝtkartojnn al alilandanoj, kun alvoko helpi nin, por ke ĉi tiu vespero estu kiel eble plej interesa.
Estas menciinde, ke la leterportistoj denove portas la esperanto-stelon sur la jako.
Estas oficiala permeso de la ministro depost la jaro 1938, kiun ni nun alte taksas.
Gekamaradoj helpu nin sukcesigi nian letervesperon, kaj sendu senprokraste poŝtkarton aŭ leteron. Ni anticipe dankas vin.

J. Cautaart, Sekr.

AFD. GOUDA

Secr.: Gr. v. Bloisstraat 30

Tuj post la liberigo kelkaj el ni kaptis la direktilojn por gvidi la grupon bonvoje. La rezulto de la verda monato estis ĝojiga, ĉar 41 kursanoj anoncis sin. En la fino de oktobro komencis 1a kurso. K-do P. Becker prenis la taskon fari el ili Esperantistojn. Nunmomente ni disponas pri lernejo. En la sama ejo ĉiumerkredevespere okazas elementkurso, kiun k-do Van Heeren gvidas.
La komenckurso samvespere okazas. Bedaŭrinde nia plej aktiva ano eksiĝis kiel estrarano pro soldatiĝo. Lia tasko estas transprenita de k-do v. d. IJssel sed por anstataŭi personon, kia k-do de Smit, ne estas facila tasko. Li baldaŭ revenu inter ni. Nia grupo havas 45 membrojn.
Komprenu bone, ni ne eksidu sur niaj laŭroj, ĉar multe da laboro ni atendas. La entuziasmo ankoraŭ ne estas tiom granda kiom ĝi devas esti, sed estas logike, ke ni bezonas tempon por denove fariĝi veraj kaj bonaj propagandistoj por Esperanto.
Ni deziras al la tuta Esperanistaro feliĉigan novan jaron kaj precipe al nia propra rondeto en Gouda.
Korespondu eksterlande, ĉar ju pli vi interrilatas, des pli vi interkonatiĝos kun niaj amikoj eksterlandaj.

AFD. HALFWEG

La 12an de decembro nia sekcio aranĝis kursvesperon kun festa karaktero, por interkontakti kun la gepatroj de la infanoj. Preskaŭ ĉiuj ĉeestis. La prezidanto parolis pri la neceso de Esperanto. Poste okazis leciono kun la infanoj.
Prezentiĝis filmo. Sukcesinta vespero. La 9an de januaro okazis kunveno. Preskaŭ ĉiuj anoj ĉeestis. La tagordo trovis la atenton de la ĉeestantoj. Por instigi la viziton al la Paska kongreso, kaj eble al S.A.T.-kongreso, ni fondis ŝparkason. Propono por ŝanĝi gazetojn kun eksterlandanoj estis akceptita.
K-do van Rijn vigle parolis pri diversaj aferoj, kaj akcentis, ke la kunlaboro de ĉiuj anoj necesas por plej interesiĝi la konversaciajn vesperojn.

La sekretario

Ni kontrolis la kason kaj atestas la bonordon. La kasisto meritas nian laŭdon.

La kontrolintoj:
G. Ples kaj C. v. d. Oord

AFD. ROTTERDAM

Secr.: Langegeer 28.

La 14an de januaro okazis nia intersekcia kunveno, ĝi estis vizitata de 79 anoj el la tri sudaj sekcioj.
K.do J. Starrenburg rakontis pri la misteroj de „Otniribal" „Kara afero sur nova telero". En tiu rakonto lia pritraktis la gramatikon laŭ grafika metodo. Tiu metodo certe estas bona rimedo por fondi en la menso de la lernantoj konkretan bildon pri la gramatiko.
Antaŭ la paŭzo, k-do Starrenburg faris enkondukon per kelkaj gramatikaj misteriaĵoj preninte el la libro „La Faraono", la Faraona labirinto. Post la paŭzo, li daŭrigis grafike la gramatikan parton. Ĝi certe estas tre interesa kaj instrua metodo.

AFD. ROTTERDAM V

Secr.: Leeuwensteinstraat 7. Z.

Kvankam ni ne multe propagandis, ni sukcesis aranĝi kvar elementajn kursojn, A kurson kaj pri du junularkursoj ni intertraktas kun la Speeltuinver. Hillesluis. Krom tio ano de nia sekcio pretas gvidi kurson en Oostvoorne.
Regas bona harmonia sfero kaj la klubvesperoj pli kaj pli interesiĝas; montriĝis ke post la milito, la anoj pli multe kuraĝas paroli ol antaŭe. 24 membroj, aniĝis al S.A.T. kaj nia sekcia S.A.T.-peranto ne ripozos antaŭ ol ĉiuj anoj aliĝos al S.A.T.
La kunlaboro kun la sekcioj 2a kaj 6a evoluas en bona direkto.

Sekretario

AFD. ZAANDAM

Secr.: Fransestraat 17, Tel. 3571.

Belangrijke ledenvergadering

Wij nodigen onze leden uit tot het bijwonen van een bijzondere ledenvergadering, welke wordt gehouden op **Donderdag 14 Februari** 's avonds 8 uur in het gebouw van **Christ. Belangen** in de Bootenmakerstraat. Het gaat hier om belangrijke besprekingen en discussies, die gevoerd zullen worden in verband met het a.s. Federatie-Congres. Laat iedereen zoveel mogelijk trachten deze avond vrij te houden om deze vergadering te bezoeken. Wij maken onze leden verder er nog op attent, dat bij het secretariaat voor een ieder die daar belang in stelt correspondentie-adressen gereed liggen. Kom aan Zandamanoj, verstevig het internationaal contact.

Het Bestuur

AFL. ZUILEN

Secr.: Van Egmondkade 49

Post duona jaro de laboro ni povas konstati, ke nia sekcio kreskis, ne nur laŭ la nombro de la anoj, sed ankaŭ laŭ kapableco. En la komenco ni ankoraŭ kelkfoje devis uzi la Nederlandan lingvon, sed nun ni ne plu bezonas fari tion. La kontakto inter la anoj dum la periode de la malpermeso.
La estraro konsistas el k-doj: Broekman, prez.; Labordus, sekr.: Chr. v. d. Meijden, kasisto; F. v. d. Meijden, 2a prez.; Majoor, 2a sekr.; Imrich, 2a kasisto kaj k-dino Van Leeuwen, Libro-Servo.
Ni organizis en Zuilen komenckurson, ne tre grandan, sed la kursanoj venas konstante.
En Maarssen kelkaj el niaj anoj, kiuj tie loĝas, organizis ankaŭ komenckurson kaj laŭ nia opinio ni povas esti certaj, ke post la kurso en Maarssen sekcio estos fondata.
La Zamenhofrememortago estis por ni granda sukceso. La salono estis plenplena. La unua parto de la vespero estis iomete solena. Nia eksprezidanto parolis pri Dr-o Zamenhof, kelkaj aliaj anoj deklamis, voĉleĝis kaj muzikis.
Dum la paŭzo la kamaradinoj prezentis bongustajn tasojn da kafo kaj teo kun ĉokoladaĵoj, kuketoj kaj sukeraĵoj. Ĉio estis ŝparita el propraj porcioj.
Post la paŭzo okazis la gaja parto kaj ĝi estis efektive gaja. Komuna kantado, muziko, deklamado, k.t.p.
Ĉiuj ĉeestantoj estis kontentaj.
Kaj kiel la parolinto de tiu vespero mi volas fini kun la vortoj: „Ni iru konstante antaŭen paŝon post paŝo." Nia devizo estas: „Por Esperanto, la mondlingvo".

Sekretario

El S.A.T.-rondoj

SAT-RONDO EN ARNHEM.

Nia rondo nun nombras, komence de la nova jaro, 22 anojn. Jam realiĝas nia devizo: Ek al la tridek!
Vizitu nepre nian kunvenon dimanĉon, la 17an de februaro, matene je la 10.30a horo precize, Taklaan 5.
Ni pritraktos la broŝuron „For la Neŭtralismon".
Aliĝu al S.A.T., por ke vi ricevu „Sennaciulon". Anoncu vin ĉe la loka peranto.

A Henstra,
Taklaan 5, Arnhem.

SAT-RONDO 'T GOOI.

Dimanĉon, la 6an de januaro okazis kunveno de S.A.T.-anoj loĝantaj en 't Gooi. Post enkonduko de k-do O. de Vries, fondiĝis SAT-rondo. Oni decidis ĉiun unuan dimanĉon de la monato kunveni. La sekvonta kunveno okazos la 3an de februaro, hejme ĉe k-do de Vries, Prof. Poelstraat 39, Hilversum. La fondkunvenon partoprenis 16 SAT-anoj. La jarkotizo estas fiksita je *f* 3.—, el kiu sumo estas *f* 2.50 por SAT kaj *f* 0.50 por la rondo. Entute la rondon partoprenas 26 anoj.
K-doj atentu! Pli da anoj estas varbleblaj en 't Gooi. Ni revigu S.A.T.-on en nia regiono!

La peranto, O. de Vries,
Prof. Poelstraat 39, Hilversum.

A'DAMAJ SAT-ANOJ, ATENTU!

Dimanĉe la 24an de februaro, matene de la 10a ĝis 12½ horo okazos kunveno por la A'dama SAT-rondo.
Kunvenejo: „Het Eiland, Gr. Wittenburgerstraat 39. Tre verŝajne ĝi estos diskutmateno. Jam nun vi notu la daton! Ĉeestu ĝustatempe! Ne-SAT-anoj estos bonvenaj!

La perantino:
H. Oudenhooven-Bishoff,
Bestevaerstraat 127³,
Amsterdam-W.